# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo decembro 2023**

## ZAMENHOF-TAGO DENOVE EN FUENLABRADO

En decembro, kiel tradicie, ankaŭ madridanoj festos la Tagon de la Libro kaj la Kulturo en Esperanto, ankaŭ nomatan Zamenhof-Tagon. Ĉi-jare denove, la Madrida Esperanto-Liceo festos ĝin kun la Fuenlabrada grupo, profitante ĝian sidejon kaj ĝian gastemon.

Kiam? Sabaton la 16-an decembro, de la 11:00 ĝis iam, laŭ la bontrovo de ĉiu partoprenanto.

Kie? La loko estos la sidejo de la Fuenlabrada Esperanto-Ligo, tre ampleksa, kaj facile alirebla el la ĉefurbo aŭ aliaj madridaj urboj, ĉar ĝi troviĝas je 300 m de la haltejo "Fuenlabrada Central" de RENFE kaj metroo. Ĝi troviĝas ene de la C.E.P.A. "Paulo Freire" kiu konsistas el kvin konstruaĵoj. Oni devas eniri ĉe Av. de las Naciones, tra la pasejo por aŭtoj kiu kondukas al interna parkejo. Ĉiukaze, je la 10:45 kelkaj el ni iros kune el la stacio ĝis la sidejo.

Por kio? Ni ĝuos kvar prelegojn (pri ŝakludo, pri universala deklaracio de homaj rajtoj, pri la antikva egipta literaturo, pri lingvoj en Filipina insularo). Almenaŭ, ankoraŭ oni povus inkludi ion pli se vi volas kontribui. Meztage, ni kunmanĝos en ordinara restoracio.

Ĉu vi venos? Se jes, ATENTU!: ni bezonas scii kiom eble plej frue ĉu vi planas akompani nin en komuna tagmanĝo, por havigi al ni lokon anntaŭmenditan.

Jen la loko per google maps: https://maps.app.goo.gl/wcgZRa54bsvncX2y6.

Por konfirmi (nur necese se vi intencas kunmanĝi) aŭ proponi kontribuon, skribu al madrid@esperanto.es.

Pliaj detalojn bv legi en https://eventaservo.org/e/e08616.

## PRELEGO EN BIBLIOTEKO

La 15an de novembro matene, Alejandro Pareja prelegis pri Esperanto al grupo de pliaĝuloj kiuj ricevas klasojn en la Publika Biblioteko "Luis Rosales" en kvartalo Carabanchel Alto. Ĉeestis ampleksa grupo kiu atente sekvis la eksplikojn.

MEL profitis la okazon por donaci aron da libroj pri Esperanto kaj por lerni la lingvon, al la publika Biblioteko, kiun ricevis ties direktorino.






## PRI STRATO DOKTORO ZAMENHOF EN ĴURNALO

La 5-an de novembro, la retgazeto *El Diario* aperigis raporton pri la strato Doctor Zamenhof en Madrido, kaj la bedaŭrinda stato en kiu ĝi troviĝas, kun titolo *"Zamenhof, el inventor del esperanto, tiene una (no) calle dedicada junto a un parque histórico"*. Vi povas legi ĝin en la adreso: https://www.eldiario.es/1_a0bf5d.

## SURPRIZAJ VIZITOJ DE GRAVULOJ

La unuasabatan renkontiĝon en la strato Idioma Esperanto partoprenis akademiano Jesper Jacobsen, kiel ni estis jam anoncintaj. Sed, surprize, ankaŭ alvenis por verpermanĝi kelkaj gravuloj survoje pro profesiaj taskoj: la paro Peter Baláž kaj Dorota Rodzianko, respon-deculoj de la entrepreno E@I kaj zorgantoj pri internaciaj kongresoj, kaj la vicprezidanto de UEA, Fernando Maia. En la subaj fotoj vi povas vidi la aspekton de la plena tablo en du malsamaj momentoj de la vespero.




La sekvan lundon, 6an de novembro, Fernando Maia trovis momenton por veni en la sidejon de MEL kaj interparoli kun la ĉeestantoj. Ni ĉefe parolis pri lia profesia fako, la klimata kaj energia transiro kaj la rolo de la petrola industrio, kun tre interesaj vidpunktoj kaj debato pri tiu grava socia problemo. Ni ankaŭ havis okazon iom babili pri la esperanta movado, la poste okazinta Virtuala Kongreso de UEA, la UK en Tanzanio kaj aliaj interesaj temoj.

## KURSOJ DE ESPERANTO

Memoru nian pasintmonatan anoncon ke en januaro komenciĝos la kurso en la sidejo de la madrida grupo. Ĝi estas celata al komencantoj kaj disvolviĝos la sabatojn inter la 11a kaj la 13a horoj matene. La prezentado kaj unua leciono estas programita por la 13-a de januaro. Informojn petu al: madrid@esperanto.es, kaj bv. diskonigi al viaj konatoj kaj amikoj.

## PLIAJ RENKONTOJ

La 30an de novembro Juan del Castillo prelegas en la sidejo de Fuenlabrada Esperanto-Ligo, pri la lingvo Toki Pona, ekde la 18,00 horo.

La kutima renkonto unuasabata okazos la 2-an de decembro, je la 18,30, denove en la polpejo O Miño en strato Idioma Esperanto, num. 2, de Madrido (metrohaltejo Alsacia, lineo 2).

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30. Notu tamen ke pro la pluraj decembraj festoj, ni ne povos certigi malfermon ĉiujn lundojn, do bv antaŭe interkonsenti.

## PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*, nun *X*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com